Since the call, "Who will be the fifth with \$25?" we have received not one but *four* "fifths": F. M. Steadman, M. S. Alderton, J. H. Furay, Robert Karlson. Other contributions: Esperanto Society of Milwaukee, \$10; Dr. Luella K. Beecher, \$8; H. Schroepel, J. D. Shea, Donald Stephens, Lt. R. C. Marble, Elmira Esperanto Club, A. E. Regal, H. G. Schatz, \$5 each;

Lee Atford, \$3; R. Eadie, \$2.50; Donald Munro, Dr. A. M. Schwager, Jas. H. Morrison, R. A. Flavell, Workmen's Benefit Fund Tremont Branch, Wm. Vathis, Wm. H. Donaldson, Prof. F. Tomich, \$2 each; Capt. J. W. Wood, John Richards Orth, Emile Blais, Jean Tremblay, R. R. Lambert, Elwood Etter, Esther Kovari, \$1 each. Our thanks to all!

Contributions to EANA may be deducted by the donors in arriving at taxable net income. Contributions are deductible up to 15 percent of your income. The General Publicity Fund is a part of EANA activities.

Report on Fund Activities

Total Contributions to Publicity — \$551.20 (since Feb. 1945). Total for \$1000 Fund to date — \$285.00 (minimum \$5).

Specific Activity: 1) 300 copies of AE 3'45 with letter to Delegates of San Francisco Conference, to Senators and Representatives, to a selected list of eminent leaders in international affairs. 2) 300 copies of AE 5'45 with letter to selected list of linguists and educators. 3) 300 copies of AE 7'45 sent to Youth Clubs and to leaders in Scout and Youth groups, to Scout leaders in all the American Republics. 4) 250 copies each of AE 9'45 and 11'45 to linguists, language teachers, and those interested in International Problems.

Results of Campaign: This publicity effort resulted in a number of subscriptions and memberships to AE and EANA from professors in various Universities and from those interested in following the progress of the Inter-language Esperanto. There has been an increase in membership in EANA since March 1945 of about 60 members, which may be partly credited to our publicity efforts. Hundreds have obtained a favorable impression of Esperanto which will be immensely valuable to us in the future.

Total Expenditures of Fund to 1'46: \$182.83. This includes payment for 250-300 extra copies of each issue of AE, multigraphed special letters, envelopes, postage, printed slips.

COMMITTEE TO DATE: V. Murajo, E. Dodge, "Miami," C. Ramsay, F. Steadman, M. Alderton, J. H. Furay, Robt. Karlson, Hal Ewen.

MORTO KAJ VIVO

REMEMOROJ EL ALIA MONDO

W. SOLZBACHER

Jurnalisto, kiu antaŭ nelonge vojaĝis en Germanujo kaj revenis de tie al Londono, skribis al mi, ke Walter Knopf ne plu vivas. La Nazioj ekzekutis lin en 1939, je la komenco de la milito, konsiderante lin kiel "perfidulo". Eble la Gestapo trovis en Polujo dokumentojn pri lia kontraŭhitlera agado. Li restis fidela al siaj idealoj ĝis la morto. Liaj multaj amikoj en ĉiuj landoj neniam forgesos lin. Li estis unu el tiuj praktikaj idealistoj, kiujn la mondo tiom bezonas en ĉiuj sferoj de la vivo.

Walter Knopf, profesoro en Beuthen, germana industria urbo tute proksima al la pola landlimo, fondis la Katolikan Esperanto-Societon "Frateco" kaj prezidis ĝin de 1919 al 1933 — kaj poste ankoraŭ subtere. "Frateco," vigla, aktiva kaj bone organizita grupo, aliĝis al Germana Esperanto-Asocio (GEA), Internacio Katolika (IKA), Mondjunularo Katolika (MOKA), kaj Paca Ligo de Germanaj Katolikoj (F.D.K.). La disvastigo kaj praktikado de Esperanto, la batalo kontraŭ militistaj tendencoj, kaj la kreo de pli bonaj rilatoj inter germanoj kaj poloj estis inter la ĉefaj taskoj de tiu organizo. Kiam Hitler fariĝis diktatoro de Germanujo, la grupo estis dissolvata kaj Walter Knopf havis multajn malfacilaĵojn kun la Gestapo; sed li neniam ĉesis labori. Por korespondado kun aliaj landoj li uzis adreson en Katowice, Polujo. De tie mi ricevis en Luksemburgo, kie mi loĝis tiam, multajn leterojn kaj poŝkartojn en Esperanto, kiujn li subskribis "Semper Idem". Li vere restis "ĉiam la sama". Miajn respondojn mi subskribis "Juna Batalanto" kaj sendis pere de nia komuna pola amiko, D-ro Bochenski, kiu priorgis la interŝanĝon.

Mi komencis korespondi kun Wal-

ter Knopf en 1925, mi kredas. Liaj informoj kaj konsiloj estis ĉiam solidaj kaj utilaj, kaj mi treege ŝatis lian helpon dum la naŭ jaroj, kiam mi eldonis la Esperanto-gazeton "La Juna Batalanto" kaj dum la mallonga periodo, kiam mi estis redaktoro de "Katolika Mondo". Lia grupo abonis Esperanto-gazetojn pogrande.

En la somero de 1930 mi havis la plezuron viziti lin kaj lian afablan Esperantistan edzinon. Mi interrompis vojaĝon en Polujo por iri al Beuthen kaj konatiĝi kun la gesamideanoj de "Frateco". Gesinjoroj Knopf gastigis min, kaj dimanĉe posttagmeze "Frateco" organizis ekskurson kaj piknikon. Ie en la arbaro, proksime al la germana-pola landlimo, mi faris paroladon, parte en germana lingvo, parte en Esperanto, raportante ĉefe pri miaj spertoj kaj travivaĵoj en Polujo.

Antaŭ ol iri al Beuthen, mi partoprenis en la bela montara regiono je la pola-slovaka landlimo en internacia tendaro de junulargvidantoj el multaj landoj de Centra kaj Orienta Eŭropo. En la arbaro super de la Dunajecvalo, proksime al Sromowce, ni estis gastoj de la Pola Skoltina Asocio kaj de ĝia estrino, Pani Malkowska, virino kun brila intelekto kaj granda koro. La plej multaj el la skoltinoj estis tro junaj kaj tro okupataj por partopreni en niaj diskutoj, en kiuj, poloj, ĉeĥoslovakoj, rumanoj, bulgaroj, latvoj, germanoj, francoj, angloj, norvegoj kaj aliaj interŝanĝis opiniojn kelkfoje tre malsamajn; sed la ĉesto de la skoltinoj donis al la konferenco tute specialan atmosferon. Ili ne nur zorgis pri nia materia bonfarto, sed ankaŭ en la liberaj horoj helpis nin pli bone kompreni iliajn landon kaj popolon. Mi estis apenaŭ du tagojn en Dwor Cisowy ("Taksusa

Bieno”), kiam, dank’ al ili, mi jam kantis parkere kaj entuziasme la plej belan popolkanton de la polaj “gorali” (montaranoj):

“*Za gorami, za lasami, za dolinami
Podbili sie dwaj gorali czupagami...*”
 (“Malantaŭ la montoj, malantaŭ la arbaroj, malantaŭ la valoj, du montaranoj batis unu la alian per dikaj bastonoj...”) La kanto havas vigan, amuzan melodion, kvankam ĝi temas pri tiel tragedia afero kaŭzita — kiel vi certe jam divenis — per belulino, kiun la kanto nomas “ma dziewczyna” (“mia knabineto”). Do mi lernis la kanton rapide, kiel ĉiu alia en la tendaro. Mi estis malpli sukcesa pri la popoldancoj de la “gorali”.

En Dwor Cisowy ni diskutis kaj kantis en multaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto, ĉar troviĝis inter ni Esperantistoj el diversaj landoj. Ni ŝatis speciale la Esperanto-tradukon de slovaka popolkanto, kiu komenciĝis tiel: “*Al la rivereto, bluokula knabineto,
Al la rivereto ne iradu plu...*”

Al “nia” rivereto, la Dunajec, ni tamen iris ofte. La regiono estis sovaĝe bela je ambaŭ bordoj. La montoj kaj arbaroj estis pacaj kaj majestaj. Sed ni sciis, ke je unu bordo la lando estis pola, je la alia ĉeĥoslovaka, kaj ke tiu regiono estis estinta kaj estonta objekto de politika konflikto kiel tiom da aliaj regionoj en Eŭropo. Ni estis konvencintaj por vidi ĉu ni povus fari ion por servi la pacon.

Je la lasta vespero ni ariĝis ĉirkaŭ granda kampfajro, kies brilo disvastiĝis ĝis trans la landlimo. Geamikoj diverslandaj faris mallongajn paroladojn. Mi estis la lasta. Mi parolis pri paco kaj internacia frateco, klopodante esprimi ion el tio, kion ni ĉiuj sentis en tiu solena horo ĉirkaŭ la

fajro. Mi staris ĝuste vidalvide al la polaj skoltinoj, kiuj aŭskultis atente. Je la fino, la plej juna el ili, apenaŭ 14 aŭ 15-jara knabino, nomita Jadwiga, venis al mi kaj diris kun voĉo, kiu estis duone solena, duone amuza: “Miaj fratinoj sendis min, por diri al vi, ke ni ĉiuj amas vin kaj ke ni dankas vin por via bela parolado. Ni rememoros ĝin kaj ĝojus, se vi kelkfoje pensus pri ni. Tial ni petas vin, akcepti insignon de nia Pola Skoltina Asocio kiel signo de amikeco kaj rememoro.” Tium insignon, kiun Jadwiga donis al mi, mi portis kun mi dum multaj jaroj, kaj mi konsideris ĝian posedon granda honoro.

Kie estas nun Jadwiga — mi neniam sciis ŝian lastan nomon — kaj la aliaj polaj skoltinoj el Dwor Cisowy? Kiam ilia lando estis invadita de la germana armeo en 1939, ili ja ne plu estis knabinetoj, sed plenkreskaj virinoj, multaj el ili sendube edzinoj kaj patrinoj. Ĉu Jadwiga estis unu el tiuj, kiuj mortis en aeratako aŭ pro malsato? Ĉu ŝi estis unu el tiuj, kiuj estis forkondukataj por sklava laboro aŭ unu el tiuj, kiuj fariĝis viktimoj de nepriskribeblaj krimoj? Mi ne scias kaj eble neniam scios. Repensante pri tiu tempo en Dwor Cisowy kaj pri mia vizito al la Esperanto-Grupo “Fratego” en Beuthen, mi nun sentas doloron kaj eĉ honton. Revo kaj entuziasmo ja ne sufiĉas por realigi pacon kaj fratecon en la mondo. Pena laboro kaj realista agado ankaŭ estas necesaj por malebligi ripeton de la ĵus pastinta katastrofo kaj por konstrui mondon, en kiu junulinoj kiel Jadwiga havos pacan estontecon antaŭ si kaj en kiu ne plu ekzistos sangavidaj tiranoj por mortigi homojn kiel mian bonan Esperantistan amikon Walter Knopf.

“*America Esperantisto*” estas la plej efika propagandilo por montri ke Esperanto vivas kaj progresas. Mendu ilin progrande je favora prezo.

LA JARCENTO DE LA ORDINARA HOMO

HENRY A. WALLACE

Sekretario de Komercio por Usono

Redaktista Noto: Ĉi tiu estas la dua el tri sinsekvaj partoj de la epoka parolado de Henry A. Wallace. La tezo estas ankoraŭ tre grava — ja eĉ pli grava nun post la eksplodo de la atoma bombo.

★

(*Daŭrigo*)

La marŝo de libereco dum la antaŭaj 150 jaroj estis longedaŭra popola revolucio. En tiu Granda Popola Revolucio, estis la Usona Revolucio de 1776, la Franca Revolucio de 1789, la Latin-Amerikaj revolucioj de la epoko de Bolivar, la Germana Revolucio de 1848, kaj la Rusa Revolucio de 1917. Ĉiu parolis por la ordinara homo per esprimoj de sango sur la batalkampo. Kelkaj iris al troeco. Sed la signifa afero estas ke la popolo palpescadis sian vojon al la lumo. Pli da ili lernis kumpensi kaj kunlabori.

La popola revolucio celas al paco kaj ne al perforto, sed kiam la rajtoj de la ordinara homo estas atakitaj, tio ellasas la furiozecon de ursino kiu perdis ursidon. Kiam la Nazi-psikologoj diras al sia mastro Hitler ke ni en Usono eble povas produkti centmilojn da aerplanoj, sed ke ni ne havas volon por batali, ili nur trompas sin kaj lin. La vero estas ke kiam oni ofendas kontraŭ la rajtojn de la usona popolo, kiel oni jam ofendis kontraŭ tiujn rajtojn, la usona popolo batalos kun senkompata furiozo, kio pelos la antikvajn kaŭrantajn Teŭton-diojn ree en siajn kavernojn. La Götterdämmerung estas veninta por Odin kaj lia bando.

La popolo estas en marŝo al eĉ pli plena libereco ol iam ĝuis la plej bonŝancaj popoloj de la tero. Nenia kontraŭ-revolucio de la Nazi-anoj haltigos ĝin. La ordinara homo elpelos la Hitler-marionetojn el kaŝo en Usono, en Latin-Ameriko, kaj en Hindujo. Li detruos ilian influon. Neniaj Laval-

uloj, neniam Mussolini-uloj estos tolerataj en la Libera Mondo.

La popolo, en sia jarmila kaj revolucia marŝo antaŭen, por aperigi tie ĉi sur la tero la dignon kiu estas en ĉiu homa animo, tenas kiel sian kredon la Kvar Liberojn, deklaritaj de Prezidanto Roosevelt en lia komunikado al la Kongreso je la 6-a de Januaro, 1941. Tiuj kvar liberecoj estas la vera koro de la revolucio por kio la Unuiĝo de Nacioj prenis sian pozicion. Ni, kiuj loĝas en Usono eble opinias ke estas nenio tre revolucia pri libereco de religio, libereco de esprimo, kaj libereco el timo pri la sekreta polico. Sed kiam ni komencas pensi pri la signifo de libereco el bezono por la ordinara homo, tiam ni scias ke la revolucio de la antaŭaj 150 jaroj ne estas finita, aŭ jen en Usono aŭ en iu ajn alia nacio en la mondo. Ni scias ke tiu revolucio ne povas halti ĝis libereco el bezono estas efektive atingita.

Kaj nun, dum ni antaŭeniras al la efektivigo por la Kvar Liberoj de tiu popola revolucio, mi dezirus paroli pri kvar devoj. Estas mia kredo ke ĉiu libero, ĉiu rajto, ĉiu privilegio havas sian prezon, sian respondan devon sen kiu ĝi ne povas esti ĝuita. La kvar devoj de la popola revolucio, kiel mi vidas ilin hodiaŭ, estas jene:

1. La devo por produkti ĝis la limo.
2. La devo por transporti kiel eble plej rapide al la batalkampo.
3. La devo por batali per ĉiuj niaj fortoj.
4. La devo por konstrui pacon — justan, bonfaran kaj daŭran.

La kvara devo estas tiu kiu inspiras la tri aliajn.

Ni malsukcesis pri nia tasko post Mondmilito N-ro 1. Ni ne sciis kiel klopodi por konstrui daŭran tutmondan pacon. Ni ne konstruis pac-trak-

taton sur la fundamenta doktrino de la popola revolucio. Ni ne tutkore penis por krei mondon kie povus esti libereco el bezono por ĉiuj popoloj. Sed eĉ per niaj eraroj ni lernis multon, kaj post la nuna milito ni troviĝos en pozicio por utiligi nian scion en la konstruado de mondo kiu estos ekonomie, politike kaj, mi esperas, spirite solida.

Moderna scienco, kiu estas krom-produkto kaj esenca parto de la popola revolucio, teknologie ebligis ke ĉiuj homoj en la mondo ricevu sufiĉon por manĝi. Mi diris antaŭnelonge al S-ino Litvinoff: "Unu celo de tiu ĉi milito estas por certigi ke ĉiuj en la mondo havu la privilegion tage trinki kvarton da lakto." Ŝi respondis: "Jes, eĉ duonon de kvartoduono." La paco devas signifi pli bonan normon en la vivado de la ordinara homo, ne nur en Usono kaj Anglujo, sed ankaŭ en Hindujo, Rusujo, Ĉinujo kaj Latin-Ameriko — ne nur en la Unuiĝo de Nacioj, sed ankaŭ en Germanujo kaj Italujo kaj Japanujo.

La jarcento en kiun ni eniras — la jarcento kiu elvenos el la nuna milito — povas esti kaj devas esti la jarcento de la ordinara homo. Eble estos la oportuno de Usono por sugesti la libererojn kaj devojn per kiuj la ordinara homo vivados. Ĉie la ordinara

homo devas lerni por konstrui sian propran industrion per siaj propraj manoj en praktika maniero. Ĉie la ordinara homo devas lerni por pliiĝi sian produktadon por ke li kaj liaj infanoj fine povas pagi al la mondkomunumo ĉion kion ili ricevis. Neniu nacio havos la Di-donitan rajton por ekspluati aliajn naciojn. Pliiĝaj nacioj havos la privilegion por helpi plijunajn naciojn ekiri sur la vojo al industrio, sed devas esti nek milita nek ekonomia imperiismo. La metodoj de la deknaŭa jarcento ne efikas en la popola jarcento kiu estas komenconta. Hindujo, Ĉinujo, kaj Latin-Ameriko havas grandegan koncernon pri la popola jarcento. Dum iliaj popolamasoj lernas legi kaj skribi, kaj dum ili fariĝas produktaj maŝinistoj, ilia grado de vivado duobliĝos kaj triobliĝos. Moderna scienco, kiam tutkore dediĉita al la ĝenerala bonstato, havas en si eblajn potencojn pri kiuj ni ankoraŭ ne songas. Karteloj en la paco venonta devos esti submetitaj sub internacia kontrolo por la ordinara homo, krom esti sub sufiĉa kontrolo de la respektivaj enlandaj registaroj. Kiam internaciaj monopolaj kombinoj estas sub kontrolo, tiam inventoj povas servi la tutan popolon anstataŭ nur la malmultajn.

(*Daŭrigota*)

BARGAINS IN GOOD ESPERANTO READING

Send to *Joseph Leaby*, 1754 Lanier Place, Washington 9, D.C., for these book bargains which are offered to lower our book stocks.

<i>Rozujo Ĉiumiljara</i> , Payson	25c
<i>Akrobato de Nia Sinjorino</i>	25c
<i>Blanche, Virgulino de Lille</i>	25c
<i>Miserere kaj Thais</i> , Payson	25c
<i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , Payson	25c
<i>Ginevra</i> , Privat	25c
<i>Princo Vanc'</i> , Putnam k Beetes	25c
<i>Surprises at Sylvia Farms</i>	15c

Taso de Amservo, Taylor-Weems 25c
Sub la Meznokta Suno, Wendell

with covers 25c, without 20c
(Above books sold at 6 for \$1.00)

Juneco kaj Amo, Payson
cloth covers 40c, paper 25c

Ask about other occasional books.

Subscribe to *Readers Digest* \$3.00

Special sub for short time \$2.75

"RD" for Service people 1 yr. \$1.50

Subs taken for any publication, at regular and club rates. ASK.

THE ESPERANTO STUDENT

Esperanto is always pronounced just as it is written. The vowel sounds a, e, i, o, u, may be indicated by the vowel sounds heard after "b" in the English words; *bar, bear, bier, bore, boor*. Esperanto "e" and "o" have no exact equivalent in English: "e" is similar to the "a" in "chaos", and the "o" to "o" in "obey", both pronounced rapidly. Be careful not to drawl these sounds out as we do in English.

En la Butiko

En la butiko estas multaj objektoj: libroj, cigaroj, cigaredoj, horloĝoj, ĉokolado. La eleganta sinjoro staras en la butiko kaj rigardas la objektojn. Alia sinjoro, la vendisto, diras al li: "Bonan tagon, Sinjoro! Kion vi deziras?" La eleganta sinjoro montras al la horloĝoj: "Mi deziras aĉeti novan horloĝon. Kiom kostas la malgranda ora horloĝo?"

"Ho, la ora horloĝo estas ja la plej bona — kaj ĝi kostas nur kvin dolarojn!" respondas la vendisto.

"Kvin dolarojn! Ĝi estas sufiĉe multekosta . . . sed mi bezonas novan horloĝon. Tre bone, mi aĉetos ĝin." La sinjoro donas la monon al la vendisto, li pagas lin, kaj do la vendisto vendas la horloĝon al la eleganta sinjoro.

In the Store

In the store are many objects: books, cigars, cigarettes, clocks, chocolate. The elegant gentleman stands in the store and looks at the various objects. Another gentleman, the salesman says to him: "Good Day, Sir! What would you like?" The elegant gentleman points to the clocks: "I wish to buy a new clock. How much does the small gold clock cost?"

"Oh, the gold clock is indeed the best — and it costs *only* five dollars!" answers the salesman.

"Five dollars! It is quite expensive . . . but I need a new clock. Very well, I will buy it." The gentleman gives the money to the salesman, he pays him, and so the salesman sells the clock to the elegant gentleman.

Professor Edwin L. Clarke, Examination Committee, reports the following certificates granted: *Atesto pri Kapableco*, Patricia K. Alexander, Lydia Allen DeVilbiss, Morris Morrison, all of Miami, Fla. *Atesto pri Lernado*, Philip Henry Hensley, of Homestead, Fla.

Memberships in the International Esperanto League are due for 1946. EANA is affiliated with IEL, and by virtue of your membership in EANA you are an Associate Member of IEL. For further benefits to Esperanto and to yourself you may become an Individual Member of IEL, by additional payment as follows: MJ (Member with Yearbook), \$1. MA (Member with Yearbook and the all-Esperanto magazine "Esperanto Internacia"), \$2. Send IEL individual memberships direct to *Donald E. Parrish*, 328 W. 46 St., Los Angeles 37, Calif., or through EANA.

Esperanto in the News: The following newspapers have carried items on Esperanto: *Friends Intelligencer*, Sept. 1945; *Milwaukee Sentinel*, Sept. 5, 1945; *Portland Press Herald*, Oct. 6, 1945 (Editorial); *Tune In*, Oct. 1945; *Colliers*, Sept. 15 and 28, 1945; *Evening Capitol*, Annapolis, Md., Oct. 25, 1945; *Arkansas Gazette*, Nov. 22, 1945; *This Week Magazine*, Dec. 15, 1945; *Worcester Telegram*, Worcester, Mass. & *Tribune-Republican*, Meadville, Pa. both carried the AP dispatch "Esperanto — Key to One World"; *Western Stamp Collector*; *The Capital Times*, Madison, Wis.

AL MIA BUĈISTINO

RAYMOND SCHWARTZ, *Parizo*

Ĉi tiu poemo, represita el *Franca Esperantisto*, pravas, ke nia bonhumora fakulo pri poezio, *Raymond Schwartz*, famkonata kiel fondinto de la Esperantist-kabaredo *Verda Kato* kaj kiel estinta redaktisto de *La Pirato*, bone travivis la militon. Pirato ŝtelinte ĉi tiun poemon, la redaktisto de *AE* tamen simpatias kun *Raymond Schwartz* kaj sendos al li, kiel honorario, kelkajn funtojn da usona viando en konservoj.

SinJORINO buĉistino,
kiu tronas ĉe la kaso
kaj klasike, laŭ difino,
bonodoras je bov-graso,

mi bezonas al vi diri
komplimenton pri la sano:
Vidi vin kaj ne admiri
povus nur vegetarano!

Vi aspektas fenomena
pri-malmanko-atestaĵo,
kie ĉio estas plena —
speciale la korsaĵo.

Apud la fadenfiguroj
de tro longa fast-epoko
viaj gasbalon-konturoj
havas guston de provoko!

Se vi amas, mi supozas,
ke vi amas nur pogrande.
Vi ne per kulero dozas,
sed abundas tuj ĝisrande!

Por tarifi vian flamon,
oni pes-unuo prenas
la normalan kilogramon,
kaj el tio mi komprenas,

ke posedi vian koron —
kun konvena aldonparto —
reprezentus la valoron
de tutjara viandkarto.

Mi rezignas konsekvence
pensi plu pri am-propono,
kaj mi petas nur, kompanse,
ŝaf-kotleton . . . sen kupono.

Kiel Pagi El Eksterlando ?

Esperantistoj el multaj landoj skribis al *Amerika Esperantisto*, esprimante laŭdon kaj admiron pri la gazeto kaj demandante. Kiel ni povas aboni? Ekzistas tri metodoj:

1. El kelkaj landoj oni povas sendi ĉekon aŭ poŝtmandaton. La laboro povas esti iom plisimpligata, se kelkaj personoj kune sendas unu ĉekon. La abonprezo estas unu dolaro kaj duono por unu jaro.

2. Oni povas aboni, sendante 30 Internaciajn Respondkuponojn. Ili estas haveblaj en la poŝta oficejo. Ni scias, ke en kelkaj landoj 30 Respondkuponoj kostas multe pli ol unu dolaron kaj duono, kaj ke tiu pagmaniero estas sufiĉe multekosta.

3. El landoj, el kiuj oni ne povas sendi monon al Usono, ni akceptas ankaŭ novajn bonkvalitajn Esperanto-librojn. Sendu la libron aŭ librojn kaj indiku la oficialan prezon. Ni liveros 6 numerojn de *AE* por ĉiu dolaro kaj duono de la valoro. Ne estas necese skribi antaŭe, se la valoro de unu librosendaĵo estas malpli ol 5 dolaroj. Se ĝi estas pli, bonvolu demandi nin antaŭe ĉu ni povas utiligi la librojn, kiujn vi oferas.

AMERIKA ESPERANTISTO, 114 West 16 St., New York 11, N. Y., Usono

LEGENDO PRI LA ŜTONA ELEFANTO

NATALIE WEIFFENBACH

Fraŭlino Weiffenbach, de Coral Gables, Florida, tradukis ĉi tiun legendon el la angla lingvo, kiam ŝi estis studento en unu el la Esperanto-klasoj de David Earl.

En Arizono estas ŝtonego kiu similas al elefanto. La Indianoj rakontas legendon pri la ŝtona elefanto kiu staras en la dezerto:

Antaŭlonge kiam la blankaj homoj sciis nenion pri Ameriko, la tuta lando apartenas al la Indianoj. La ĉefo de la Indianoj estis tre saĝa, tre bona kaj forta, sed li ne havis filojn. Kiam la ĉefo sentis ke li maljuniĝis, li alvokis ĉiujn junajn Indianojn kaj diris al ili: "Tiu el vi estos mia filo kiu alportos al mi en la daŭro de unu jaro la plej fortan objekton en la mondo. Ĝi devas esti pli forta ol la suno, pli forta ol la vento, pli forta ol la dezerto, ol la monto, aŭ ol la rivero dum diluvo."

La junuloj foriris por serĉi la plej fortan objekton en la mondo. Iu alportis al la ĉefo medikamenton faritan el la veneno de la sonserpento. Alia alportis kvindek kojotojn, kiujn oni ligis kune. Sed la ĉefo nur ridis kaj skuis la kapon. Inter ili estis juna viro nomita *Theeka*, kiu foriris kun arko kaj sago.

Theeka marŝis tra la dezerto dum multaj tagoj. Li marŝis ĝis li atingis landon, kiun homo neniam antaŭe vizitis. Li marŝis tra profunda varmega sablo. Subite li vidis objekton kiu movis. Estis elefanto. Li kriis: "Tiu estas la plej granda besto en la mondo." Li kuris post la elefanto, sed ne povis atingi ĝin. Li sekvis la elefanton dum multaj tagoj, sed ne povis kapti ĝin.

Unu tagon li vidis alian objekton. Estis virino. Kiam ŝi alvenis al li, li vidis ke ŝi estis tre bela, juna virino. De tempo al tempo li rigardis ŝin, kiu restis apud li, sed kiu ne diris eĉ unu vorton. Theeka ne volis paroli kun ŝi, ĉar li timis perdi la elefanton, sed li sentis ke li amis ŝin. Postnelonge la junulino falis. Theeka ne haltis. Li postsekvis la elefanton sed lia koro suferis. Sed li ne povis suferi longe. Li donis unu lastan rigardon al la elefanto kaj diris: "Adiaŭ, plej forta besto! Mi revenas al ŝi kiun mi amas." La spirito en li mortis, sed lia koro kantis. Kiam li atingis la junulinon, ŝi levigis, ŝi metis siajn brakojn ĉirkaŭ lia kolo kaj kisigis lin.

Tiam Theeka diris: "Mi ne deziras plu la fortan beston. Mi amas vin. Vi estas dolĉa kiel la floro en la printempo." La bela junulino respondis: "Mi montros al vi la plej fortan objekton en la mondo. Venu!" Ŝi prenis lian manon kaj gvidis lin al la elefanto. Subite la elefanto haltis, ĉar eta birdo flugis ĉirkaŭ lia kapo, kaj kantis am-kanton. La elefanto haltis ĝis la birdeto konstruis neston sur lia kapo. Ĝi haltis tiel longe, ke ĝi iĝis ŝtono kaj vivas eterne.

Tiam Theeka komprenis. Li kondukis sian belan junulinon al la ĉefo kaj diris: "Mi trovis la plej fortan objekton en la mondo. Estas la amo!" La estro respondis: "Vi kaj viaj filoj estos ĉefoj de la Indianoj."

ESPERANTO-KRONIKO

Parley Parker Christensen nun troviĝas kiel la nova Prezidanto de la Esperanto-Klubo de Los Angeles. S-ro Christensen lernis Esperanton en la jaro 1910, kaj multe propagandis ĝin de post tiam. Li servis en diversaj postenoj de la movado, kaj estis Vic-Prezidanto de EANA en 1931-32. En la politiko li multe partoprenis — kaj estis kandidato por ofico kiel Prezidanto de Usono en 1920 (Farmer-Labor Party). Li nun oficas kiel Konsilanto por la urbo Los Angeles.

★

Sennacieca Asocio Tutmonda. Laŭ plej freŝdataj informoj SAT neniam mortis, sed havis katakombecan vivon dum la militjaroj. El Paris jam dissendiĝis Manifesto al la Tutmonda SAT-anaro. Komence de 1946 reapero *Sennaciulo*. Klopodoj estas farataj por aperigo de tria, ampleksigita eldono de *Plena Vortaro*.

★

Pastro Daniel Hughes el Detroit bele tradukis la Esperanto - poemon "Sur la Kampo" de Daĉjo Richardson en la anglan kaj kimran lingvojn. Li sendis la kimran tradukon al ĵurnaloj en Kimrujo kaj ni nun atendas la publikigon.

★

Bulteno de la fama Simfonia Orkestro de Bostono publikigis artikolon pri Esperanto. La titolo estas: "Entr'acte, Muziko kaj Esperanto, per Kritikisto Ernest Newman (Sunday Times, London)." La titolo estas en Esperanto kaj la artikolo iom ŝerce diskutas la libreton "Muzika Terminaro" de Montagu C. Butler.

★

Lima Esperanto-Asocio ĉiujare aliĝas al EANA amase. Bona ekzemplo por ĉiu klubo! Nova estraro de la Klubo estas: D-ino L. K. Beecher, Prez.; S-ino Harry Jay, S-ro Earl Sealts, Vic-Prezidantoj; S-ino Arthur M. Vaughn, Sekretario.

En Windsor, Ontario (Kanado), D-ro W. Solzbacher, kunredaktisto de AE, faris prelegon la 25an de Novembro. Kvankam li menciis Esperanton nur unufoje en la parolado, li ricevis 5 demandojn pri la lingvo en la demando-respondo-periodo kaj tiel havis okazon paroli pri ĝi detale. Intereso pri Esperanto kreskas.

★

En la Esperanto-Societo de Detroit D-ro W. Solzbacher paroladis la 26an de Novembro pri la nuntempa stato de la Esperanto-movado en la mondo. La kunveno okazis en la hejmo de Ges-roj E. Sievers.

★

Reprezentanto de la Itala Ambasadoro parolis ĉe la kunveno de la Esperanto-Klubo-Harmonio en Nov-Jorko, la 1-an de Decembro. S-ro Carlo Almagia parolis pri la "Post-Militaj Celoj de Italujo." Ĉe la sama kunveno la societo proklamis honoron al S-ro H. W. Smart por elstara laboro por Esperanto dum la jaro 1945.

★

Prelegisto pri internaciaj aferoj, D-ro Francis S. Onderdonk, en Ann Arbor kaj Detroit, mencias Esperanton en preskaŭ ĉiuj paroladoj, kiujn li faras en la plej diversaj grupoj.

★

Heleno Heidi Scherer alvenis en la mondon je la 27a Novembro 1945 dum kiam ŝia patro Joseph R. Scherer (Joroŝo) Eks-Prezidanto de EANA faris paroladon pri Esperanto al 500 studentoj en la Supera Lernejo en Canoga Park apud Los Angeles. Nun la eks-globtrotulo provizore ne vojaĝos ĉirkaŭ la mondon, sed li kaj lia edzino Heleno instruos Esperanton en privataj klasoj al Heleno Heidi (Heidi estas fama svisa nomo). La plej juna denaska Esperantistino jam sendis sian kotizon por membreco en EANA kaj IEL por 1946.

ESPERANTO-KRONIKO

Cora L. Fellows, tre amata Esperantistino en la Nov-Jorka movado, rimarkigis nin pri nova kaj plibona priskribo pri "Universal Language" en la kuranta aldono al "Nelson's Loose-Leaf Encyclopedia." Tio nin atentigas ke ni devas klopodi por pli bonaj priskriboj en aliaj enciklopedioj pri Esperanto.

★

Wm. P. Vathis nun troviĝas en la armeo kie li certe propagandos Esperanton kiel ĉiam. El la familio Vathis nun troviĝas en la armeo ok-el-ok de la junaj familianoj. Preskaŭ Vathis-armeo!

★

Nova Esperanto - Klaso en Klevlando, Ohio, sub la gvidado de Profesoro Frank Tomich de Fenn-Kolegio. La Kolegio ĝentile cedis belan ĉambron, kaj la klaso nun regule funkcias kun pli ol 15 studentoj. F-ino Jessie Scott de la Esperanto-Societo de Klevlando multe helpis.

★

Charles E. Peterson el Bell, California sukcesis varbi kvin novajn jarabonojn por AE dum 1945. Ĉu vi ne povas fari same?

★

La Esperanto-Interlingva Asocio en New York organizis sian unuan aŭtunan kunvenon en Hotel New Yorker la 10an de Novembro. D-ro W. Solzbacher paroladis pri "Esperanto Marŝas Antaŭen — Ĉirkaŭ la Mondo." Inter la gastoj estis tri eminentaj meksikanoj, el kiuj S-ro Macedonio Platas estas elstara amiko de Esperanto.

★

Itala Milit-Kapitano en Usono estas Esperantisto. Kapitano Vincenzo Rusco venis al Usono unue kiel militkaptito, sed poste servis en la Itala Serv-Taĉmento. Pere de Esperantistino, S-ino D. B. Fuller, li abonis al Amerika Esperantisto. Antaŭ nelonge li revenis al Italujo.

Kvar Ĉinaj Esperantistoj nun troviĝas en Usono. Tri studas en la aerkorpuso kaj unu estas studento ĉe Universitato en Ĉikago. Ili estas: A/c Hung Ping Cheng, A/c Yu-Chiang Wang, Lt. Francis Fan, kaj S-ro Lee Nel-son. Bonvenon al Usono! Ili ĉiuj estas anoj de EANA. Ni mencias ankaŭ S-ron S. T. Pai, ĉina samideano nia, kiu troviĝas inter la Subtenantoj de EANA. Ili ĉiuj antaŭenigos Esperanton kaj en Usono kaj en Ĉinujo. Brave!

★

Helpo al Eŭropaj Samideanoj: El Nederlando kaj Italujo venis kelkaj petoj por vestaĵoj, radringoj por bicikloj, kaj manĝaĵoj. Esperantistoj kiuj deziras helpi en tiuj kazoj, skribu al ni por informo.

★

La Broŝuro pri Okcidenta Virginio estas nun preta por dissendado. S-ro Roland Ruff, RFD No. 2, Box 233, St. Albans, West Virginia, sendos la broŝuron kune kun mapo de la ŝtato al ĉiu, kiu sendas al li tri-cendan poŝtmarkon.

★

Malnovaj Anoj Revenas al EANA. Ni bonvenigas la sekvantajn samideanojn, kiuj post longa silento denove laboras kun ni en la servo al Esperanto: Tom Robbins, J. Leo Chapman, Rev. Theo Hanssen, Frank Leslie Gaines, George Haskell, Dr. Ransom Luce, John Richards Orth, Lee Arford, Albert M. Koliner.

★

Tutmonda Junular-Organizo restariĝas en Nederlando. Kunvenoj jam komencis, la geknaboj konstruis propran domon per siaj propraj manoj. La oficiala organo, *La Juna Vivo* baldaŭ reaperos en plena formo. Ĝi enhavas ludojn, enigmojn, anekdotojn, simplajn lecionojn por gejunuloj. Tiuj, kiuj interesas pri abono povus skribi al AE por plua informo.

New Esperanto Classes

Esperanto classes are now being held in various cities of the United States and Canada: Annapolis, Md., on Fridays, 4 p.m. at the Public Library on Church Circle, under the direction of Rev. James L. Smiley; Ann Arbor, Mich., Prof. Hirsch Hootkins of the University of Michigan is instructor, auspices Baha'i Center; Brooklyn, N. Y., class in Public School 212, taught by Abraham Jacobs; Coconut Grove, Florida, Miss Patricia Alexander, teacher; Fargo, N. Dak., at the "Interstate Business College," teacher, Mrs. Ety Graeffe; Grosse Point, Mich., Mrs. Mabelle L. Davis teaches a class in the Grosse Point Evening High School under the auspices of the Board of Education; Hamden, Conn., teacher, Mrs. Jeanne Blaski; Hamilton, Ontario, teacher, J. H. Hartley; Los Gatos, Calif., at the Montezuma Mountain School, taught by its President, E. A. Rogers; Lynn, Mass., class at Eastern Jr. High School, taught by Robert Alberg; Miami, Florida, under auspices of the Pan American League, teacher, Morris Morrison; Moncton, N. B., Canada, guided by Mrs. W. H. McEwen; New Haven, Conn., members of the New Haven Woman's Club, teacher, Mrs. Jeanne Blaski; New York, N. Y., at the Epiphany Branch of the N. Y. Public Library, Thursdays, teacher, Harry G. Schatz; at the International Ladies Garment Worker's Union, teachers, Ralph Bonesper and Pauline Knight; Portland, Oregon, teacher, Mrs. Anna Kincaid; Seattle, Wash., Study-Group under the direction of Byron Ela, class taught by Mr. and Mrs. Charles S. Brown to University of Washington alumni and students. Courses are now being organized at Palo Alto, Calif., under guidance of Herbert L. Thompson, and in Tampa, Florida, at the University of Tampa, under the direction of H. P. Ayers.

DEZIRAS KORESPONDI

Anoncetoj pri korespondado el Usono kaj Kanado kostas 25 cendojn por 4 linioj. El aliaj landoj, de kie estas nun malfacile sendi monon, AE akceptas anoncojn senpage. La redaktisto rezervas al si la rajton fini tiun privilegion je iu tempo.

Svisujo. S-ro Angelo Bobbia, Nidau-gasse 8, Biel Kt., Bern. 20 jara, studas ĉe Komerca Lernejo, dez. kor.

Finlando. S-ro Taito Lippahainen Lammi, Lieso. 35-jara fraŭlo, komercisto dez. kor. kun Usonanoj. Estro de kooperativa butikoj.

Usono. S-ro David Bartholomew, 819 Third Ave., Bozeman, Mont. Dez. kor. pri speciala edukado je personoj korpe malhelpataj.

Francujo. S-ro Ernest Foulou, à Tremons Lot. & Gne, Garonne. 20-jara fraŭlo, fariĝos instruisto, dez. kor. kun gejunuloj.

Svedlando. S-ro Magnusson, Poppelgatan 61, Malmoe. 33-jara svedo, kiu baldaŭ intencas viziti Usonon, dez. kor. kun ge-Usonanoj prefere en la konfekcia fako (Ladies' Garments). Skribu tuj.

Italujo. S-ro Pedrazzini Giorgio, Strado Foro Buonaparte 52, Milano. 23-jara, librotenisto, dez. kor. pri Usona vivo.

Anglujo. S-ro C. P. Cocks, 158 Morland Rd., Croydon (Surrey). Petas informojn el ĉiu lando pri la uzado de Esperanto en komerco, ankaŭ gazetojn, presajojn, leterojn, k.t.p.

Ĉeĥoslovakio. S-ro Ernesto Vana, Zilina, Slov., ĈSR, Pivovarska 3. Dez. kor. pri naturaj sciencoj, naturaj kuracmanieroj, astrologio.

Norvegujo. S-ro Eugene Grondahl, Sverdrups Gt. 9, Oslo. Dez. kor. kun eksterlandanoj.

Argentino. F-ino Susana Cursach, Entre Rios 919, Buenos Aires, 9-jara studentino, dez. kor. Ŝatas legi belajn librojn.

Belgujo. S-ro Emil Stalpaert, Steenstraat 48, Brugge. Dez. kor.

ESPERANTO BOOKS

- PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction .75c
- ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps .25c
- PRACTICAL ESPERANTO, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations .25c
- UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages **\$3.50**
- AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion .30c
- LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, by Mario A. Pei, Ph.D., Assistant Professor of Romance Languages at Columbia University. "Should become the standard handbook of the practical linguist . . . an amazing wealth of useful information and advice . . . many times worth its price." (Review in "AE"). A guide to the languages of the world, with a complete Esperanto part. 663 pages. **\$5.00**
- WORLD LANGUAGE SERIES, edited by Prof. Mario A. Pei. ESPERANTO, by G. Alan Connor and Doris T. Connor, a practical introduction to Esperanto and a systematic vocabulary and phrase-book following the pattern of Professor Pei's famous series. 32 pages. .65c
- 10-in-1 DICTIONARY OF BASIC LANGUAGE in French, German, Spanish, Italian, Russian, Chinese, Japanese, Arabic, Portuguese, Esperanto. 10 languages, including Esperanto, in a nutshell. 110 pages. Cloth \$1.50, Paper .50c
- ESPERANTO GRAMMAR AND COMMENTARY, by Major-General Cox. A very complete analysis of Esperanto grammar, with helpful lists and examples. Cloth **\$2.00**
- SEP VANGOFRAPOJ, by Karlo Aszlanyi. The most recent of the "Epoko Series." Novel translated from the Hungarian. .75c
- ESPERANTO KEY, (English), Excellent for Esperanto promotion .05c
- KARLO, by Edmond Privat, Easy First-Reader in Esperanto .30c
- "LA VOJO." Esperanto Song. Single sheet. With translation. .10c or 3 for .25c
- EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages **\$1.00**
- STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best. Cloth covers **\$1.20**
- MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition, 1942 **\$3.50**
- STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.
- INDIAN BEAD STARS, white bead background with green star in center .45c
- "LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.00. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto) **\$1.25**
- "ESPERO INTERNACIA", by Ann E. Beatty. 240 translations of well-known English hymns and songs .50c

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist," \$2.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

A Philippine guerrilla in Leyte, Adriano Ragracias, who fought for the freedom of his country during the Japanese occupation, now studies Esperanto and sees in it the solution for common understanding between the peoples of the world. He speaks Tagalog, several Visayan dialects, Spanish and English. He views Esperanto as the living interlanguage created for interchange of thought between peoples of different national languages — not to take the place of their mother tongues. He writes the Editor:

"Sir: I found it one of my greatest pleasures to read your article "Filipinos Seek a Common Language", in the American Esperantist, Sep-Oct, 1945. I received it from Lieut. John M. Brewer, USNR, now stationed in Tacloban, Leyte. I wish to congratulate you for the implications of your article."

"After pondering upon the facts of your subject matter, there came a thought to my heart, that the Filipinos, these days, are in need of a common language to express the national aspiration of our people in the common cause of the peace-loving nations of the world. That language must only be the ESPERANTO. I believe that as our country advances in education, and as generations roll on, tribal dialects have to deteriorate and become obsolete and finally disappear. The nationalized language would be maintained and cherished, while Esperanto and the nationalized language would clasp hand in hand — the international and the official languages."

"It is my deepest concern that I will continue to study, how to write and how to speak the language of Esperanto, as God liberally enables me. Wishing you a mighty success, I am yours truly, Adriano Ragracias, Provincial Guard, Tacloban, Leyte, Philippines."